

(4-a jaurigo)

Ĉio kion la homo kapablas fari, estas: prokrasti, plimalrapidi-
 gi la laboron de la naturo, ne ĉesigi ĝin. Dum la lasta parto de la
 13a jarcento la Swin kontraŭ jam malkvietigajn antaŭsignojn sed la
 Bruĝanoj ne havis la tempon priokupiĝi. La lukto kontraŭ la grafo
 kaj poste kontraŭ Francujo urĝis. Ili devis grandparte neglekti la
 ekvoprovizigon de la Swin. Tiujn batalojn pasintajn, la Bruĝanoj
 konsternite vidis la grandajn prosperojn kiujn la sablopleniĝo jam
 estis farinta. Ili organizas malsperan defendon. Jam multaj ŝipoj
 ne plu venis ĝis en Brugge. La rimedo: devigi ilin pagi pli da im-
 poste se ili haltas en Damme. Sed ankaŭ multaj ŝipoj haltis en
 Sluis. Kion fari kontraŭ tio? Dum unu tago la Bruĝanoj foriras al
 Sluis kaj komplete forbruligas ĝin. (1333) Ankaŭ oni plilarĝigas kaj
 pli profundigas riverojn kaj elfosas aliajn. Ĉio tio por alfluigi
 akvon en la Swin. Je la mezo de la 14a jarcento la malfacilaĵoj
 konenciĝas kun la grafo Lodewijk de Maelle. La atmosfero tute ne
 estas plu kvieta en Brugge. Tio multe instigas fraŭdulojn por for-
 iri en Brugge kaj ne plu reveni. 1379 la Bruĝanoj elfosas kanalon
 kiu ligas la Leie al la Swin. Surprize la armitaj Gantoj atakas
 la laboristojn kaj forkurigas ilin. Kaj tamen ĉio tio ne estas an-
 korau la morto de Brugge. Brugge restis grava urbo ĝis la mezo de
 la 15a jarcento. La Burgonda korto estis fama pro la luksego. Sed
 jam la grafo Lodewijk de Maelle organizis en Brugge grandegajn
 turnirojn kaj allogas multe da homoj. Sed precipe kiam la dukoj de
 Burgondio iĝas grafo de Flandrujo la luksegoj festoj okazas en
 Brugge. Ankaŭ la domoj kiujn ili posedas estas palacoj. Ĉiujfoje
 kiam okazas naskiĝo au geedziĝo au enterigo en la grafa familio la
 homamasoj alvenas por vidi la belegajn festojn au servantaron kiel
 nuntempe por vidi la fanan procesion de la Sankta Sango. Brugge es-
 tis kiel moderna ĉefurbo. Tiuj nobelaj familioj estas ankaŭ protek-
 tantoj de arto. Je tiu tempo vivas en Brugge la mondfanaj Memlincx,
 Van Eyck kaj aliaj. Je tiu tempo ankaŭ vivas la unua presisto Jan
 Erite kiu havas kiel lernanto Caxton, la unua angla presisto. Bru-
 ĝaj muzikistoj estras la kapelojn de la franca reĝo Ludoviko XII kaj
 en Venecio. Multaj bankistoj starigas siajn kontorojn ĉi-tie.

Mi nomas kelkajn ĉefajn datojn el tiu tempo de parado kaj riĉa-
 montraĵo:

1440 : Filipo la Bona okazigas sian eniron en Brugge.

1448 : Turniro de S-ro Jacques de Lalaing.

1453 : Ludoviko XII vizitas Brugge.

1460 : Karlo la Malta edziĝas.

1470 : Filipo la Bona mortas.

Tamen ankaŭ tio finiĝas. La trafiko sur la Swin kaj Reye estis
 tro malfacila. Aliaj havenoj profitas pro la falo de Brugge: Ant-
 werpen kaj Lontrecht. La komercistoj forlasis nian urbon. Certe es-
 tas ke la centro de komerco kaj industrio en la 16a jarcento ne plu
 estis Flandrujo sed Brabantio. Tamen certe estas ankaŭ ke sen la sa-
 blopleniĝo de la Swin Brugge ankoraŭ longtempe estus restinta la
 Venecio de la Nordo. Brugge estas morta. Depost tiam Brugge ne ŝan-
 ĝis. Dum jarcentoj ĝi restis sama.

1562 Brugge iĝas episkopejo.

Nur dum la lastaj jaroj Brugge iĝas ionote alia. Turismo estas
 nun unu de la ĉefaj priokupaĵoj de l'homo. Precipe la Anguloj ne pre-
 volas forvojaĝi. Grandan se ili venas al Brugge. Dum sonoro la
 granda Placo estas kvazaŭ plenplena aŭtomobilejo. Brugge estas nun
 tre tre grava turisma centro. Ankaŭ la Nederlandanoj ekkonas Brugge
 Brugge estas nun ankaŭ ligita al la marhaveno Zeebrugge kiu ĉiujare
 pligraviĝas. En la antaŭurboj de Brugge, precipe Assebroek, sude de
 Brugge, oni konstruis multegajn domojn. Vere Assebroek iĝis mal-
 granda urbo. Oni povas antaŭvidi ke tiuj ĉirkauaĵoj baldaŭ formos
 unu tuton al Brugge. (Noto de la redakcio: tiu plano nun jam efek-
 tiviĝis ekde Septembro 1942) Oni nun ekkonstruas grandan novan
 modernan stacidomon okcidente de Brugge (nun jam kvar jaroj funkcias
 Tie denove la homoj kaj domoj anasiĝas. Oni do povas antaŭvidi ke
 nia urbo estas post kelkaj jaroj tre granda urbo. Nun ĝi havas prok-
 simume 60.000 enloĝantojn, sen la antaŭurboj.

Eble post ion d' tempo oni ne plu rajtas paroli pri "Brugge la
 Morta".

(Finota - verkis: ROOSE F.)

8368888888

SHRIBTALENTOJ DE NIAJ GENEBROJ: "Ni konstruu nian feliĉon"

Preskau ĉiuj homoj pensas ke dependas de la homoj ĉirkaŭ si kaj de la cirkonstancoj, ĉu oni estos feliĉa jes aŭ ne. Gravega eraro. Ĉu oni estos feliĉa aŭ malfeliĉa tio dependas nur de ni mem.

Li volas pruvi tion.

Homo kiu perdis tutan sian fortunon plendas - ne sen motivo -. Li sentas malfeliĉon, li estas malfeliĉa. Nun ci certe diras: jen li plendas pro la malbonaj cirkonstancoj. Tiuj cirkonstancoj igas lin plendi. Mi diras: eble, sed ne tute certe. Estas eble ke, se tiu homo ne estus renkontinta tian malfeliĉon, li tamen plendus. Ĉu vi ne rimarkis ja ke homoj kiujn la sorto neniam grave trafis, tamen plendas tiel multe kiel tiujn kiujn la sorto treege trafis. Ili ne plendas pri gravaj aferoj, sed pri bagatelaĵoj. Homo kiu neniam perdis 1.000 Fr. sentas sin ege malfeliĉa se li perdas 100 frankojn, ankaŭ se li estas tre riĉa. Ekzistas esceptojn, certe, sed tiuj esceptoj afiras la ĝeneralan regulon. Aliaj homoj plendas ĉar la teo malvarmiĝis. Mi povus tre facile doni mil ekzemplojn de bagatelaĵoj pri kiuj la homoj plendas. Kien ĉio tio pravas? Ĝi pravas ke la plendo estas malvirto de malkuraĝo, kiu estas ene en ĉiu homo. Oni do devas lukti kontraŭ tiu malvirto, lukti en kaj kontraŭ si mem.

La grado de nia feliĉo ne dependas de la cirkonstancoj, kaj de la homoj, sed de la fakto ĉu oni jes aŭ ne venkis tiun malvirton en si. Oni devas komenci venkante la plendon pri bagatelaĵoj. Kaj miriga estos la rezultato. Vi post ion da tempo rimarkos ke ankaŭ vi ne plu tiel multe plendas pri sufiĉe gravaj aferoj. Kaj kian trafos vin vere grava bato, vi sentos multe pli da kuraĝo; sekve vi estos multe malpli malfeliĉa. Kaj vi estos pli ens pensu pri eternaj valoroj, pri kio eterne restas. La tiel notataj malfeliĉoj igos vin pli vivi en supernatura kaj dia sfero. F.R.

& & & & & & & &

Ci-suba artikolo devis aperi en nia kristnasknumero sed pro manko da loko ĝi ne eblis. Ni nun sperigas ĝin ĉar la estraro ĉiam ĝojas kiam la okazo sin prezentas neti ensendaĵoj de niaj genebroj en la revuo.

- - - - -

SILENTU, KANONOJ. ESTAS LA HORO DE LA PAGO: - Kristnasknokto en la tranĉeoj.

La nokta ĉielo estis senmova kaj serena super la tranĉeoj kiel tage kaj la homoj, kiuj, kiel talpo, grategis sur la tero en terdelfosaĵoj, jam obmonatojn de ili enloĝitaj, revenis laĉega pro vana atako. Ĉiuj elataĵoj al la tranĉeo, apenaŭ cent metroj antaŭ ili, estis senrezultaj.

Alproksimiĝis Kristnasko, la Altfasto, kiu alportas beatecon por ĉiuj bonvolaj homoj. Al ĉiuj... Kristanoj aŭ ne-Kristanoj. Ili estis bonvolaj, la homoj en uniformvestoj, sur kiuj estis frostitaj, kotaj buloj, la homoj kun la nigra flavruĝe rustitaj pafiloj, de kiu nur la bajonetpinto brilis en la nildblanka lunlumo. Ili estis bonvolaj, ĉar ili komprenis tre bone, ke la milito estas kruela puno, kiun Dio venigas al la homoj, puno ankaŭ al la venkanto.

Cent metrojn pli malproksima kuŝis la Francoj, eguljunaj, egulentuziisme foririntaj por defendi la patrujon, sed jam post kelkaj semajnoj, ili estis spertintaj la ektingiĝojn de la tranĉeinfero. Tie ili kuŝis nun sub la senmova, blua ĉielo kaj ripozis, atendente nervage ĉu la venonta nokto xxxxx netus ĉion artileriafajron, an ĉu la Kristnasknokto estus uzita por tiu malkuraĝiga rampardo, kiu post bombariĉo antaŭus la elatakon.

La postenoj kun periskopo kaj la rampantaj patroloj, kiuj post ĉiuj du horoj devis riski sin kelkajn metrojn antaŭen por skolti, ricevis severajn ordonojn; neniam novo, kiel eta ajn, kiun faris la malamikoj povis resti nerespondita.

Nenio okazis... La vespero transformiĝis senbrue en la nokto, la unua Kristnasknokto. Ili ne jam sciis, tiuj homoj, ke al Romo estis sendita peto de la Papo al la militministerioj por respekti la Kristnasknokton. Ili ankaŭ ne sciis, ke ne estis farita formala konsento de la militanto al la Papo. Ili sciis nenion, tiuj malfeliĉuloj, eĉ ne ke ili vivis (rafotoje almenaŭ). Ili ne gustumis kion ili manĝis aŭ trinkis. Ili dormis firme ŝajnante unuigi kun la argilo ĉirkaŭanta kaj sonĝis pri karaj malgravaĵaj aferoj.

Kaj la Kristnasknokto malsupreniris super la tranĉeoj en la plej paca stato. La ĉielo estis plensplendrita per brilanta arĉo da diamantoj, kaj tie en la malproksima patrujo nun certe la plej junaj generatoj genuleklis antaŭ la tremblilataj planetoj ĉirkaŭ la lanĝujo, en kiu la Kristinfano dolĉe ridetis. De tempo al tempo lunkuglo supreniris al la tranĉeoj, lumigis la titar trenigan teron kaj estingiĝis. Oni restis atenti. Sed tio estis ankaŭ da nura novo. Ien la pago estis ellasita. La silento regis. Estis kvazaŭ ĉiu sentegis la solenecon, la sanktecon de la venonta nez-nokthoro.

Kristnasknokto... nun glitis dolĉe pacon en la dolorigitaj animoj. La nokto tie-ĉi havis preskaŭ svenigan forton.

La Kristnaskideo igis tie-ĉi konsolo, kuraĉo kaj ĉiuj, ĉiuj sen escepto, ankau ili, kiuj pli malfrue nenian, eĉ ne la plej eton sentis de tiu beata nuntato, estis trankvilaj nun, kaj dum ili penis ripozi, faldis senkonscie la manojn kaj penis pri aferoj, ne de tiu londo. Ankorau kelkaj momentoj, iam estos la HORO.

"Ankorau ok minutoj" - flustris unu de la gardostarantoj, kiu sidis sur laj genuoj antau la periskopo - "ankorau ok minutoj".

La leutenanto rigardis al sia horloĝo... La Franco ankau restas trankvila. Estis altstatura, blonda viro, tiu gardostaranto, vere Germana tipo, unu de la plimaljunuloj, ĉar li estris jam fortan sekcion estante ordinara soldato. Li estis la pangajnanto hejme, atenta viro, fama kantanto, kiu en la fama Konja Katedralo portis en ekstazo la preĝantojn pro la sentenco de lia baptonvoĉo. Kion da tempo jam pasis post la lasta fojo, ke li kantis ion seriozon. Jam tri jarojn li estis nun al la fronto, kvarfoje vundita, sed neniam grave.

"Ankorau kvar minutoj", li diris, kaj la aliaj, kuŝantaj sur la grundo, proksime ĉe la elirejo, kontraŭ ĉiu surprizo, ili ne respondis, ili estis hejme en iliaj ideoj kaj kelkaj sentis akvundiĝi iliajn okulojn. Neniun voĉon, neniun paŝon, neniun ĝemon oni audis. "Ankorau minuto" sonis la atentiga voĉo de la gardostaranto... "movado en la malanika linio, rekte antau ni... preta por fajri. Subite unu de la oficiroj leviĝis kaj staris ĉe la gardostaranto. Tie rekte ĵus antau li, staris super la parapedo soldato, la kapo senkovrita... li tenis la pafilon dekstrane kaj al la longa bajoneto pendis blanka kuko; la maldekstran manon li levis al la ĉielo.

"Ne pafu" sonis laŭte ordono. La homoj direkte proksimaĵ ĉe la oficiro, leviĝis, demandis kio okazis; post kelkaj momentoj la tuta okupado de la tranĉeo staris rekte. La "poilu" restis en sama sinteno, kaj antau ol la homoj sin demandis kion signifas ĉi-tio, belego tenorvoĉo ekkantis la faman francan Kristnaskkanton: "Minuit Chrétien".

Profunda kortuŝo vibrigis ĉiujn, kiuj audis tiujn sonojn, malgrau ne komprenante multajn vortojn... ĉar ili komprenis ke tie-ĉi estis voĉo, paca voĉo al la ĉielo, kaj ne el ili, nek amiko, nek malamiko, penis unu sekundo pri malamikeco, sorto kaj detrudo.

"Popoloj sur la genuoj"

"Estas la horo de la savo".

Tie-ĉi okazis revo, kiu portis ekstazon, kaj kiam la lasta tono forestis, saltis sen ke, estis perolita ion pri ĝi, la alta Germano sur la parapedo kaj kantis per vibranta voĉo: "Stille Nacht, heilige Nacht".

Estis tie kiuj falis sur la genuoj kaj levis la manojn al la ĉielo; estis tie, la kapo plorĝeranta, kaŝita post la manoj plenkotaj. Kelkaj estis al la limo de frenezeco pro tiu neatendita beateco, sed ĉiuj, tie la malamiko kaj tie-ĉi la amiko... ili sentis je tiuj momentoj la plej altan amikstazon: "De el la Manĝujo, la Sankta Manĝujo, nur el tio, radias la eterna paco inter la popoloj".

El K.A.J. Monstrevuo - Decembro 1939 - tradukis: Etienne De Baets

& & & & & & & & & &

Dat het onze groep niet langelt aan talentvolle leden, niet enkel in het stellen van Eo-artikels maar ook in de dichtkunst in de moedertaal, bewijst voldoende het hieronderstaande werk van een onzer genenbroj.

=====

OORLOG.

't Is oorlog in het land,
en strijd in menschenherten,
en breken van den band,
en smeden van veel smerten.
En alles steeds on niet.

En woordenwerk bevecht 't geweld,
en saanenkonst en dure eed.
Toch ligt steeds woord geveld,
daar haat den oorlog sneedt.
En alles steeds on niet.

Herinnering vernijdt geen daad
zij 't nog zoo slecht. Snaad
vleeft herinnering van de daad,
en drijft tot nieuwe snaad.
En alles steeds on niet.

Dit alles steeds on niet,
tot menschen liefde mint,
en grootschheid van de daad bezint.
Dan komt de oorlog niet.

(samideano Fons NORRO)

78. 5/6, 8/9, 10/11, 12/13

Nome de kelkaj malkultaj fideluloj el la ĉefurbo, kaj ankau nome de...
tita nuna fidela Esperantistaro en nia malgranda patrujo, mi vokas al vi
"MEMBROJ DE "PACO KAJ JUSTECO", ANOJ DE FIANERA LIGO ESPERANTISTA, FIRME
TENU LA VERDSTELAN STANDARDON ! BRUGAJ ESPERANTISTOJ, VI ESTAS LA KLENO
DE ESTONIA, NOVA, FORTA ESPERANTISTA VIVO EN FLANDRUJO ! KONSCIU LA GRAVECO
DE VIA NUNA ELTENECO ! FIRME TENU ! EC SE FINE EN VIAJ MANOJ NUR RESTUS
PECO MALGRANDA DE NIA KARA ESPERKOLORA FLAGO : FIRME TENU ! VI ESTAS EN
FLANDRUJO LA FUNDAMENTO SUR KIU NI REKONSTRUOS, VI ESTAS : NIA ESPERO !

Dum Zamenhoftago 1942
(subskr. F. Cortvriendt)

& & & & & & & & &

ANGULO DE LA SERĈEMULOJ : - Geanatoroj atentu ! En la granda kristnask-
konkurso (silabenigno) la presisto forgesis meti la difinon n°51 = mal-
utila kreskaĉo. Pro tio la redakcio atendas la respondojn ĝis plejlaste
la 15/2/43 anstataŭ fino de januaro. Kiu ensendos la unua? Ankoraŭ neniu
solvo envenis malgraŭ la gajnetaj premioj.

Kaj jen tutnova konkurso. Ĝi celas trovi sesliterajn substantivojn laŭ
donitaj difinoj. Por faciligi la serĉado oni aldonas: 1° la unuaj literoj
de la ekzaktaj vortoj formas proverbon 2° laŭ donitaj difinoj ĉiam eblas,
niksante laŭdece la ses literoj de la demanditaj vortoj, formi el ĉiuj de
tiuj 32 substantivoj, du triliteraj substantivoj. Oni nur demandas: la 32
substantivoj sesliteraj, la 64 triliteraj substantivoj kaj la proverbo.
La signo (R) post unu difino signifas radikvorto.

Oni ensendu la solvon antaŭ fino de februaro al la sekretario I SERENTANT.

NOVA ENIGMO.

Unua vico de tri- literaj substantivoj. - Vico de la seslite- raj substantivoj - Dua vico de la trili- teraj substantivoj.

- | | | | |
|---------|--|-----------------------------|------------------------------|
| | 1. familiano | - abismo | - interna korpparto (R) |
| KOR | 2. interna korpparto (R) | - diaĵa respondo (R) | - parto de konstruaĉo ALD |
| RAS | 3. gento (R) | - marfiŝeto (R) SARDDEL | - preparita (R) LED |
| TUS | 4. malsaneto (R) | - vojaĝanto (R) TURIST | - religia objekto PIT |
| | 5. nerve muskolkulturo (R) | - molisano | - parteto ERD |
| KAT | 6. dumbesto (R) | - korpparto TOKAKO | - metalo BRO |
| TAS | 7. trinkilo (R) | - pruvsigno ATESTO | - trinkaĉo TEO |
| RAU | 8. parto de veturilo (R) | - norda korpo (R) KADAVR | - malpieno (R) KAV |
| ORO | 9. metalo | - paroladisto (R) ORATOR | - rodulo (R) MUS RAT |
| TEL | 10. planedo (R) | - malpeza plumaro LA VUGO | - fano AĝO |
| | 11. mitologia figuro | - prespropono | - taĉmento (R) ROT |
| | 12. trinkaĉo | - tempospaco | - brakparto (R) |
| | 13. vestaĉo (R) | - metalo | - rimeno (R) ZOO |
| PIR | 14. frukto (R) | - reblostilo EMPIRO | - inklino EMO |
| OLE | 15. grasa fluidaĉo (R) | - subtera vojaleric | - mezurunuo |
| JUL VAT | 16. unuo de elektra rezistanco - plibeligaĉo | - dolĉa suko (R) | - arĉilio (R) FOK |
| | 17. alta herbo (R) | - speco de glazuro | - kaptilo (R) RAT |
| MAJ | 18. monato (R) | - antikva reĉo (R) | - fluidaĉo (R) |
| | 19. birdo (R) | - profesortitolo (R) DOKTOR | - fundo (R) |
| FEA | 20. planedo (R) | - birdo (R) UROGEL | - korpparto (R) KAR |
| AGO | 21. fano | - muzikinstrumento | - cilindro (R) RUL |
| JUL | 22. parto de floro (R) | - lernolibro | - kolekto ALD |
| ASO | 23. ludkarto | - vestaĉo (R) | - plata lignopeco (R) |
| | 24. konstruaĉo (R) | - insekto | - malsaneto (R) |
| | 25. melodio (R) | - blua farbo (R) | - legkolektaro (R) KOD |
| TUF | 26. rodulo (R) | - rambesto | - malindiginta haŭto (R) KAL |
| | 27. mola hararo (R) | - svelaĉo interna | - volplenumo (R) FAR |
| | 28. aspiro (R) | - ekraro (R) | - sovaĝa ĉovo |
| | 29. putro (R) | - grada aliformiĉo EVOLVO | - muzikinstrumento (R) |
| VED | 30. planda ekkrio | - piulo | - luno OLO |
| | 31. parteto | - konstelacio | - malkuraĉo (R) TIM |
| INO | 32. virino | | - metalo OLO |

888888888888888888888888888888

KIEL ONI ĜEN ESPRIMAS EN ESPERANTO ?

- Tio estas akvo al lia muelilo - (Dat is koren op zijn molen)
- Pri have najbara oni estas malavara - (Van een anderms leer is het goed niemen enijder).

XXX XXX
XXXXXXXXXXXX